

Jean Forge: *Abismoj*. El la Esperanta originalo tradukis Aini Setälä. Tähti-serio n-ro 30. Eldonejo Otava 1924. 168 paĝoj. Prezo broŝurita 6 markoj.

Abismoj estas nekutima verko. Ĝi estas antaŭgusto de modernaj literaturaj fluoj, kiuj estas ankoraŭ nekonataj al ni. La konstruo de la verko estas mallonge jena: Al verkisto mankas ideoj. Tiam iu hinda fakiro helpas lin, lasas lin rigardi mirindan vitran globon kaj li povas vivi kiel kvar malsamaj personoj unu post alia.

Oni devas konsenti, ke per tio konstruiĝis sufiĉe inda romano. Ĝi havas sentojn, doloron kaj pasion. Grandioza estas la unua priskribo de la ebrio de Ernesto Muŝko. La erotika inklinado kaj pasio de Halino Borki posedas samtempe demonan kaj inferan praforton.

Restas la ĝenerala impresado, ke la ĉefroluloj de la romano vivas pli-malpli rande de frenezo. Iliaj sentimentoj tro ofte similas deliron, ili havas ne animan sanon sed kaosan spiritan malsanon.

Oni povas rekomendi la legadon de la libro pro ĝia nekutima karaktero. Ke ĝi estis envicigita en la serio Tähti [Stelo] de distraj legaĵoj estas tamen strange, ĉar ĝi ne estas distra legaĵo. Por tio ĝi estas tro peza.

Abismoj esta, cetere, nekutima ankaŭ pro tio, ke originale ĝi estis verkita en Esperanto.

-s S-

Turun Sanomat, 15 julio 1924